XVIII ORDINARA TEMPO 1-an de aŭgusto 2010

Kies estos tio, kion vi preparis? – Komento al Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Lk. 12,13-21

En tiu tempo, unu el la homamaso diris al Jesuo: "Majstro, diru al mia frato ke li dividu kun mi la heredaĵon". Sed li respondis: "Ho viro, kiu starigis min super vi kiel juĝanton aŭ dividanton?"

Kaj li diris al ili: "Zorgu kaj gardu vin for de ĉiu avideco, ĉar, ankaŭ se iu estas en la abundeco, lia vivo ne dependas de tio kion li posedas."

Poste li rakontis al ili parabolon: "La bieno de unu riĉulo donis abundan rikolton. Li rezonis en si mem: "Kion mi faros, ĉar mi ne havas lokon, kie meti miajn rikoltojn? Jen kion mi faros - li diris - mi disbatos miajn grenejojn kaj konstruos aliajn pli grandajn kaj tie amasigos la tutan grenon kaj miajn posedaĵojn.

Poste mi diros al mi mem: Animo mia, vi disponas je multaj posedaĵoj, dum multaj jaroj; ripozu, manĝu, trinku kaj amuziĝu!". Sed Dio diris al li: "Malsaĝulo, tiun ĉi saman nokton estos petita de vi via vivo. Kaj kies estos tio, kion vi preparis?". Tiel estas pri tiu kiu kolektas trezorojn por si mem kaj ne riĉiĝas ĉe Dio".

Dum Jesuo estas parolanta pri fido en la Patro li estas interrompita de iu kiu, male, metas sian fidon en la monon. Jesuo parolas pri certeco en Dio, kaj estas male tiuj kiuj metas la certecon en siajn posedaĵojn. Ni legu en la Evangelio laŭ Luko.

"Unu el la homamaso diris al li: "Majstro" kaj la verbo estas je la imperativo, "diru al mia frato ke li dividu kun mi la heredaĵon". Do la problemo estas la kutima malnova temo de disdivido de heredaĵo. Sed Jesuo rifuzas. Por Jesuo ĉiu heredaĵo estas frukto de avareco kaj avideco, sintenoj kiu fermas neripareble la homon al Dio. Tiam Jesuo respondas al li: "Ho homo**,** kiu starigis min juĝanto aŭ dividanto" tio estas la sama respondo al tiu verbo kiu estis petita "dividu kun mi la heredaĵon" - "super vi?"

Poste li sin turnas al la disĉiploj, kaj do Jesuo rifuzas roli kiel peranto en aferoj de heredaĵoj kaj interesoj, poste li atentigas la disĉiplojn per ĉi tiuj tre severaj vortoj: “Kaj li diris al ili: ‘Zorgu kaj gardu vin for de ĉiu avideco”.

Jesuo eldiras tre severe tiun admonon, la avidecon, la amasigon de havaĵoj. Kial? Diras Jesuo: “Ankaŭ se iu estas en abundeco, lia vivo ne dependas de liaj posedaĵoj”. Kaj ĉi tie la evangeliisto skribas tri fojojn tiun vorton simptomo de la havo, la avideco, la abundeco, la posedaĵoj.

La vivo de iu homo ne dependas de tio kion li posedas, sed de tio kion li donas: ”Poste li rakontis al ili parabolon: “La bieno de unu riĉulo donis abundan rikolton. Li rezonis en si mem: “- atentu pri tiu verbo ‘rezoni’ kiun Jesuo poste ridindigos. Li opinias rezoni en si mem. Kiel pensas la riĉulo? La riĉulo pensas ĉiam por si, li opinias ke ĉio estas al li ŝuldata. Li tute ne pensas ke li povus donaci, aŭ almenaŭ kunpartigi aŭ eluzi tiun abundaĵon por helpi la aliajn.

“Kion mi faros ĉar mi ne havos lokon, kie meti miajn rikoltojn?”. Do ni scias kia estas lia rezonado ***“***mi disbatos miajn grenejojn kaj konstruos aliajn pli grandajn kaj tie amasigos la tutan grenon kaj miajn havaĵojn.”

Jen refoje tiu obsedo je la havaĵoj, je la posedaĵoj kiujn oni havas. “Poste mi diros , laŭvorte, Animo mia..” – animo signifas la saman personon – “vi disponas je multaj posedaĵoj, dum pluraj jaroj, ripozu, manĝu, trinku kaj amuziĝu!”

Do li pensas nur pri si, pri sia profito, sia intereso. Jen la surprizo, des pli miriga en iu kultura medio kie oni pensadis ke la riĉaĵoj estas dia beno. La riĉulo estis tiu kiu estis benata de Dio, kaj la malriĉulo malbenata. Kaj jen la Dio de Jesuo tute malsama.

“Sed Dio diris al li: ‘Stultulo’” Mi scias ke la tradukistoj tradukas per ‘malsaĝa’, sed malsaĝa estas tro malpeza, la vorto uzata de la evangeliisto estas tre forta. Ni ne diras al iu homo ‘malsaĝa’ sed ‘stulta’. Kaj li diras stultulo al tiu kiu kredis esti rezonkapabla.

Do la rezonadoj de la riĉulo estas rezonadoj de stultulo. “Stultulo! Tiun saman nokton estos petita de vi via vivo. Kaj kies estos tio kion vi preparis?”

Do tiu ĉi via tuta penado, tiu ĉi via tuta havaĵo, tiu ĉi via tuta avideco, kaj poste? Tiun vorton stultulo Jesuo jam uzis por la farizeoj kiujn li riproĉis ĉar ili faras ion pro sia intereso, kaj ankaŭ se laŭaspekte ili ŝajnas puraj, li diras “ilia eno estas plena je rabo kaj maljusto”.

Do la riproĉadmono estas por tiu kategorio de religiuloj kiuj samtempe estas tre alkroĉitaj al la mono, inter unu psalmo kaj la alia kontroli la kason estis praktiko kiun la religiuloj, la piuloj kapablas fari.

Kaj jen la fina admono de Jesuo***:“***Tiel estas pri tiuj kiuj kolektas trezorojn por si mem kaj ne riĉiĝas ĉe Dio”. La trezoro estas tiu kiu donas fidon: aŭ iu metas la fidon en la Patron kaj do libere metas sian propran vivon – kun tio kio li estas kaj tio kion li havas – je la servo de la aliuloj aŭ ĝin metas en siajn havaĵojn. La konkludon ni jam vidis.